

Johann Wolfgang von Goethe,
Paska promeno

tradukita de Georg Schmidt

Glaciolibere riveroj nun estas
per printempa viviga ĉarm-atmosfer':
en valo verdiĝas feliĉo-esper';
vintro retiris sin kaj kaŝrestas
malforte en kruda monto-aer'.
De tie ĝi sendas, fuĝante, per
la vent' senpotence grajnforman glacieron
en strioj al verdiĝanta ter';
sed sun' ne toleras blankan ion.
Ĉie ekmovo por streĉi, formigi,
ĉion volas koloroj vivigi;
Floroj en kamp' ne jam montras sin,
belvesta homar' anstataŭas ilin.
Turnu vin, por de sur ĉi tiu altaĵo
revidi al la urba tutaĵo.
El pordo malhela, mur-elbora.
penetras amaso multkolora.
Ĉiujn ĝojigas la suna or':
Ili festas viviĝon de l' Sinjor',
ili mem ja viviĝis el penoj,
el malaltaj domoj, loĝejoj malbonaj,
el metiaj kaj oficaĵaj katenoj,
el prem' de tegmentoj altfrontonaj,
el premega malvasto de la stratetoj,
el honorinda nokt' de l' preĝejo
ĉiuj troviĝas en plenlumejo.
Kiel rapide tra ĝardenetoj
kaj kamp' la homaro sin dividas.
kaj sur river', en longo kaj larĝo.
multajn gajajn boatojn vi vidas;
la lasta ŝipo, sub troa ŝarĝo
dronante preskaŭ, nun glitas for.
El monta eĉ krutvoja mallarĝo
briletas belvesta multkolor'.
Jam bruas homa multparolo,
jen estas ĉielo por popolo,
kontenton resonas ĝojega kri':
Tie ĉi hom' povas esti mi!

...

*Traduko de la Germana poemo "Osterspaziergang" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de Georg Schmidt.*

Arg-819-1643 (2013-02-05 10:42:56)

La traduko troviĝas en la revuo „Heroldo de Esperanto“, n-ro 13 (770), dekkvina jarkolekto, eldonaĵo de l' 1-a de aprilo 1934. [Redaktoroj: Teo Jung kaj Joseph Ferdinand Berger]. Mi, Manfred Retzlaff, kopiis tiun ĉi tradukon el la retejo <http://www.literaturo.dk/novaj.htm>, kiun verkis s-ro Lars Kromann, Danio.